

Radio Ĉerizo 17

2012-01-16

Oni diras, ke japanoj spertas tri religiojn en semajno. Ĉu vi konas, kio okazas inter ni?

En la dudek kvin(25)-a de decembro, multaj iras al kristanaj preĝejoj, kaj tie preĝas aŭ ĝuas la kulturon de krisanismo en puraj koroj. Kaj reveninte hejmon, ili manĝas ornamitajn dolĉaĵojn, kaj pasigas ĝojan nokton.

En la tago de jarfino, la tridek unu(31)-an de decembro, multaj iras aŭ aŭde vidas en televidilo budhistajn templojn por aŭdi cent ok-fojan sonoradon de basaj sonorilegoj, kio purigas ĉiujn ĉagrenojn, malbonojn, kaj agoniojn.

En la unua tago de januaro, eĉ en meznokto antaŭ tagiĝo, tre multaj vizitas jaŝirojn, kio estas la ŝintoa templo, kaj inter amasiĝo de homoj, ili preĝas al dioj, ke dioj donu benon al ili, kaj ili susksesu en ekzamenoj, kaj ili havu bebon, kaj ili gajnu multe da mono, ĵetante kelke da monoj.

Iuj kritikas aŭ mokridas, ke ili ne havas certan personon nek doktrinon al religioj. Iasence tia aserto estas prava, ĉar ili ne estas kristanoj nek budhistoj nek ŝintoistoj.

En Japanio, kompare kun aliaj landoj, ne okazis seriozaj konfliktoj inter religioj.

Fama batalo okazis en la sesa jarcento, kiam sinjoroj Mononobe kontraŭstaris al sinjoroj Soga, pri subteno de ŝintoismo kontraŭ nova religio budhismo.

Ofte oni ne malbondiras agon de aliulo, kaj permesas ĉian ajn personon por harmoniiĝo kaj ke tiu homo ne ricevu vundon. Eble tia penso aperas en ago dum semajno, havante egalan respekton al ĉiuj religioj.

Karaj aŭskultantoj!

Jam pasis unu jaro post nia komenco de elsendo kaj podkasto de "Radio Ĉerizo", kaj ĉi tiu elsendo estas la unua en la dua jaro. Por memori datrevenon, ni presos belan poŝtkarton, kaj sendos al vi, ĉie en la mondo. Presnombro estas ne multa. Urĝe donu retleteron kun via reala nomo kaj domadreson al belmonto.azia@gmail.com.

Radio Ĉerizo finas ĉi-fojan programeron. Do, ĝis reaŭdo.

Radio Ĉerizo Interncia
© 国際言語研究所 提供